# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno.

Temo.

## Mondaj heredaĵoj en Ĉeĥio

Dum la prelego estas prezentotaj la ĉeĥaj mondaj heredaĵoj kaj biosferaj regionoj:

**1e, materiaj kulturaj heredaĵoj:** Historia centro de Prago, ĉefepiskopa palaco en Kroměříž, kastelo Litomyšl, Český Krumlov (historia centro de la urbo + burgo + kastelo), Lednice-Valtice komplekso, historie kerno de Telč, Kutná Hora (historia kerno kun preĝejo de sankta Barbara + preĝejo de surĉieligo de Virgulino Maria en la urboparto Sedlec), kolono de la plej sankta Triunuo en Olomouc, juda kvartalo de Třebíč, Holašovice (sudbohemia „vilaĝa baroko“), vila Tugendhat en Brno, pilgrimpreĝejo de st. Johano el Nepomuk sur Zelená hora (verda monto).

**2e, nemateriaj kulturaj heredaĵoj:**

**Memstare:** verbuňk (danco de soldatvarbitoj en Moravia Slovakio), Karnavalaj preteriroj kaj maskoj (Hlinsko-regiono), rajdado de reĝoj (en Kyjov-regiono), blovitaj kristnaskaj ornamaĵoj.

**Kune kun aliaj landoj:** falkoĉasado,marionetado, flosado kaj manproduktitaj vitraĵoj.

**3e, biosferaj regionoj protektitaj de Unesko:** Třeboň-regiono, Křivoklát-regiono, Šumava-regiono, Krkonoše-regiono, Blankaj karpatoj kaj Suba Moravio.

**Kiam:** la 5-an de novembro 2025 je **18.30** (UTC+1)

**Prelegonto**: Petr Chrdle

**Lingvo**: Esperanto

**Kie: La renkontiĝo okazos rete per Jitsi**

Jen la ligilo:
https://meet.jit.si/moderated/43f7d1610134c4b80b45e5560715ace9e1916f8261e962d99dea0449e8962abd

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

★

# Ni rekomendas

- La 4an — 7an de decembro 2025 La 6a Virtuala kongreso de Esperanto. Rete, senpaga aliĝo por membroj de UEA ĝis 23an de novembro.
- 1-a — 8-a de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz, Aŭstrio

# Cetera programo en novembro

La 12an **Konfuziloj** – Milan Kolka, la klubejo

La 19an *Ankoraŭ ne agordita, komuna renkontiĝo kun klubo el Glivice*, rete per Zoom, je la 19a h.

La 26an **Sicilio kaj Italio** – Jana Zigal, la klubejo

Antaŭkristnaska renkontiĝo okazos la 10an de decembro.

Programo ĝis la jarfino estas jam agordita krom komunaj retaj renkontiĝoj kun poloj. Tamen mi petas vin, ke vi jam pripensu vian kontribuon al programo komence de venonta jaro.

---

Sendado de la invitiloj per kaŝitaj kopioj kaŭzas problemojn. Jam kelfoje okazis, ke mi sendis invitilon kaj neniu ĝin ricevis. Tial ni elektis senpagan dissendan servon. Mi esperas, ke uzante novan rimedon ne plu estos problemoj kun ricevado de la invitiloj. Mi ankaŭ planas aldoni en retejon formularon, por ke iu ajn povu aboni niajn invitilojn sen rekte peti min.

Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic

Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni